



LA JUNA VIVO

MONATA GAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO“

Redakcio: S-ino E. Burgler, Geleen, Markt 58, Nederlando

Administracio: S-ro G. de Vries, R.P.I. Pav. AB, Bosdijk 771, Eindhoven, Nederlando

Ĝiro N-ro 537168

Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro

T.J.O. ŜANGĜIS EN T.E.J.O.

La T.J.O.-Centro malaperis.

Niajn anojn kaj belegantojn, kiuj ne vizitis la Internacian Junular-kongreson en Ry, verŝajne okulfrapis la nomoŝanĝiĝo de T.J.O. en T.E.J.O. Vere, tio ne estas ĉiutaga okazaĵo kaj estas facile kompreneble, ke oni ne volonte faras similaĵon. T.J.O. fondiĝis en 1938, kaj dum la jaroj de sia ekzisto ĝi akiris famkonatecon en la tuta mondo. En esperantistaj redakciejoj, kongresoj, junularaj kaj pliaĝulaj rondoj, ĉie oni scias, kio estas T.J.O. Ŝanĝi la nomon povus sekve kaŭzi konfuzon kun ĉiuj malagrablaj sekvoj. La tamena ŝanĝo ne okazis pro plibeligo de la nomo (kiu estas diskutebla) aŭ por ke la Esperantistoj pli facile memoru ĝin (ĝi ja pensigas al iu trinkaĵo), sed nur laŭ propaganda vidpunkto. Multaj membroj spertis, ke ĉe varbado inter ne-esperantistoj mankas la vorto Esperanto (kaj kvankam pli lertaj propagandistoj aldonas ion similan, do ne tradukas laŭ litere malgraŭ tio, ke tion ŝatas la nesciantoj de nia lingvo), tial tia kompletigo de la nomo montriĝis necesa.

Kune kun T.J.O. malaperis ĝia Centro, kiu dum multaj jaroj kaj de la fondiĝo situis en la malgranda vilaĝo West-Grafdijk. Jam ek de 1934, kiam LJV unuafoje eldoniĝis, okazis tie la redaktado kaj administrado. Al T.J.O. Centro restas ĉiam ligita la nomo de persono, kiu dum longaj jaroj pretiĝis LJV-n kaj zorgis, ke ĝi ĝustatempe atingu niajn membrojn: f-ino Nel Kool, homo, kiu laboregis por nia organizo. Ni volas danki ŝin, tutkore, amike, samideane.

Ĉar ek de nun la redakcia kaj administracia taskoj estas farataj de nia nova redaktorino kaj nia kasisto, speciala centro ne plu ekzistas.

Ni esperas havi kun s-ino Burgler, la anstataŭantino de f-ino Kool, saman bonan kontakton, kian ni ĉiam havis kun la lastnomita. Niaj anoj akceptu nian novan redaktorinon kun lavango da artikoloj.

La Estraro.

Karaj Geamikoj,

Kiam la Estraro de TJO petis min, ke estontece mi redaktu La Junan Vivon, mi hezitis tion fari. Ne nur pro miaj aĝo kaj multokupiteco, sed ankaŭ tial, ĉar laŭ mia konvinkiĝo estas sufiĉe da lertaj kaj kapablaj personoj en la vico de la junularo. Mi la funkcion tamen akceptis (provizore por unu jaro), ĉar mi konsideris du faktojn:

1e: ke f-ino Kool nepre volas retiri sin, 2e: ke la nuntempa junularo estas ĝenerale tro ŝarĝita kaj tiam estas nia devo ĝin helpi.

LJV estas porjunulara gazeto, do m.o. ĝi nepre devas esti redaktata de junaj personoj, kiuj staras en la vivo kaj kiuj precize scias, kiel la hodiaŭa junularo pensas, agas kaj reagis, ili devas vidi klare kaj ne juĝi tre rapide. Ankaŭ inter la TEJO-anoj troviĝas tiaj personoj, maturaj por transpreni la belan, sed malfacilan taskon: redakti la propran revuon.

Mi petas ĉies kunlaboron kaj mi ĉiam pretas akcepti ne nur taŭgajn artikolojn, sed ankaŭ sugestojn kaj kritikojn.

E. Burgler-Jezsó.

ORGANIZAJ INFORMOJ.

Estraro: La taga estraro jam unu fojon kunvenis. Ĝi detale preparolis nian gazeton, konforme al la ĉirilataj decidoj faritaj en Ry. La divido de la asesoraĵoj ankoraŭ ne estas konata. En la venonta nro vi estos informataj pri tio. En konsento kun la kasisto la prezidanto decidis provizore mem prizorgi la sekr. funkcion: Helmi Veldhuyzen transloĝiĝis al Anglio kaj ne havos tempon por plene okupi sin pri tio. Felix Kat, prez. de la junularklubo „Ekstazo”, en Leeuwarden, helpos lin.

Perantoj: Michel Schmidt pro foriro al Ameriko ne plu povas esti peranto en Germanio. G. F. A. Milanovski, Bremen, estas komisiita serĉi novan. Al Michel, kiu dum kelkaj jaroj bonege kaj akurate laboris por nia organizo, ni esprimas nian koran dankon.

Ankaŭ en Nederlando mankas peranto. Pri la novelektitoj ni esperas baldaŭ doni informojn.

Regularoj: La ĝenerala- kaj kongresa-regularoj, kiuj kun etaj ŝanĝoj akceptiĝis, aperos en unu el la venontaj numeroj de nia organo.

Salutleteroj kaj -kartoj: Saluton sendis al la 8a I.J.K. en Ry: Oldrich Antoŝ, Praha, ĈSR; Omont, Versailles; Michel Duc Gominaz, Parizo, Francio; Marit Wareberg, Stavanger, Norvegio; Dimpna Wils, Delft, Nederlando; Otto Bohl kaj Hans Jürgen Logemann, Winnipeg, Kanado; Esperanto-Junularo, Herford, Germanio; prof. dro Ivo Lapenna, London, Anglio.

Al ĉiuj sendintoj ni esprimas nian koran dankon.

Ĉi loke dankas la estraro la organizinton de la I.J.K. en Ry, nian danan peranton Kaj Pedersen, kiu akurate kaj bonege aranĝis nian ĉi jaran kongreson. Ke li mem trovis nur malmultan ripozon, estu kompensata de la agrabla scio, ke liaj laboro kaj penado estis plensukcesaj.

Al ĉiuj redakcioj de Esperanto-gazetoj ni afable petas sciigi la legantaron, ke la nomo de T.J.O. ŝanĝiĝis en T.E.J.O. (Vd. la ĉefart.).

Sekretaria Jarraporto de Tutmonda Junular-Organizo T.J.O.

Sept. 1951-julio 1952.

La tradicia Internacia Junular-Kunveno de T.J.O. okazis en la nederlanda urbo Haarlem. Ĝin partoprenis proks. 280 gejunuloj el 12 landoj.

La ĝenerala membro-kunsido elektis novan estraron, kiu konsistas plene el gejunuloj: Tammo Kanter, prez.; Helmi Veldhuyzen, sekr.; Geert de Vries, kasisto; Michel Duc Goninaz kaj Kurt Meyer, asesoroj.

Oni decidis okazigi la Int. Junularkunvenon en 1952 en Danlando.

Jenaj ĉefperantoj ekziĝis: Günter Schaedel, Germanujo kaj Roger Bizet, Francujo, al kiuj ni ankaŭ ĉi-loke esprimas dankon pro la farita laboro. Ili estas anstataŭataj respektive de Michel Schmidt kaj Daniel Luez. Escepte de kelkaj, la ĉefperantoj montris ne-sufiĉan aktivecon. Tio estas konstatebla i.a. el la malkresko de la membronombro.

Jen la stato je 1.7.1952:

Alĝerio	1	Hispanujo	22
Aŭstralio	3	Hungarujo	3
Aŭstrujo	13	Irlando	1
Belgujo	9	Italujo	19
Brazilo	6	Jugoslavujo (7 abonoj)	30
Britujo	123	Kanado	3
Bulgarujo	4	Maroko	3
Ĉeĥoslovakujo	13	Nederlando	292
Ĉinujo	1	Nov-Zelando	3
Danujo	15	Norvegujo	3
Egiptujo	1	Polujo	3
Finlando	5	Svedujo	14
Francujo	49	Svisujo	5
Germanujo	76	Tunizio	1
Germanujo (Orienta p.)	6	Usono	4

La ciferoj inkluzivas aktivajn kaj subtenantajn membrojn.

Organoj: „La Juna Vivo” fariĝis denove propra eldonaĵo de T.J.O. Ĝi ne plu enhavas la instruistan kaj lernejan partojn. Por la aspirantaj anoj aperis nova, multobligita bulteno „La Burgono”. La „Peranto inter la Perantoj” aperis dufoje. Landaj bultenoj aperis en Germanujo (3), Nederlando (1), Belgujo (3), Danujo (1).

En la fino de septembro la „Regiona Ligo Baden” de la germana T.J.O.-sekcio ekziĝis el T.J.O. En decembro fondiĝis la „T.J.O.-amikaro en la Pariza regiono.”

Dum la Pentekosta kongreso de la nederlandaj esperantistoj, la estraroj de L.E.E.N. kaj T.J.O. interkonsentis, ke anoj de ambaŭ organizoj rajtas senpage ĉeesti la ordinarajn kunvenojn, unu de la alia.

La kontakto kun U.E.A. okazis regule kaj normale.

Delft, 7.7.1952.

Helmi Veldhuyzen, sekretariino.

Kasraporto.

Enspezoj.		Elspezoj.	
Saldo je 1-8-1951	f 530.92	Eldonaĵoj	f 2773.44
Kotizoj kaj abonoj	„ 2388.08	Diversaĵoj	„ 1465.94
Diversaĵoj	„ 2189.22	Saldo je 7-8-1952	„ 868.84
	<u>f 5108.22</u>		<u>f 5108.22</u>

Bilanco (je 7-8-1952).

Bonhavoj.		Ŝuldoj.	
Stoko Libro-servo	f 600.—	Fakturo de Muusses	f 273.40
Saldoj en eksterlando ...	„ 675.—	Duba mono en eksterl. ...	„ 550.—
Saldo	„ 868.84	Al Sekretariino	„ 20,—
		Ned. Sekcio 10 % kot. ...	„ 88.19
		Al L.K.K. Ry	„ 84.36
		Saldo	„ 1127.89
	<u>f 2143.84</u>		<u>f 2143.84</u>

Budĝeto (1952-1953).

Enspezoj.		Elspezoj.	
Kotizoj kaj abonoj	f 2100.—	Eldonaĵoj	f 1800.—
Libro-servo (profito) ...	„ 50.—	T.J.O. kostoj	„ 100.—
Diversaĵoj (donacoj) ...	„ 50.—	Propagando	„ 100.—
		Eventualaĵoj	„ 100.—
		Ned. Sekcio 10 % kot. ...	„ 100.—
	<u>f 2200.—</u>		<u>f 2200.—</u>

Klarigoj:

- Kasraporto:** Pro la malnovaj bonhavoĵoj (kotizo, I.J.K.) estas la enspezoj altaj.
Pro la malnovaj ŝuldoj (eldonisto, I.J.K. kaj F-ino Kool) estas ankaŭ la elspezoj altaj.
- Bilanco:** La bonhavoĵoj estas iomete malaltaj kalkulitaj kaj la duba mono iomete alta (Brazilio k.t.p.).
La fakturo de Muusses koncernas pagotajn vendendajn librojn.
- Budĝeto:** La kalkulado de la kotizoj estas bazita sur membronombro de 700 personoj po g. 3.—.
Ĉar mi ne ricevis financon raporton de la Libro-servo mi taksis la profiton de la Libro-servo malalta.
La kalkulado de la eldonaĵoj estas bazita sur 10-foja aperigo po f 150,— plus sendkostoj.

Generale ni ne rajtas esti pesimismaj, sed ankaŭ ne optimismaj. Se ni sukcesos akiri multe da (!) novaj membroj kaj se ni sukcesos vendi pli multe pere de la Libro-servo, tiam tio donos al ni pli bonan financon perspektivon. Do: faru vian taskon!

Generale la kunlaboro de la ĉefperantoj estis ne sufiĉa. Mi tamen volas danki ilin, kaj speciale tiujn, kiuj regule kaj akurate sendis la financajn raportojn.

La kasisto, Geert de Vries.

Subskribintoj kontrolis kaj trovis la kaslibrojn en bona ordo.

Ili rimarkas, ke la monsumoj en la bone prizorgitaj raportoj de f-ino N. Kool ne aparte estas kontrolitaj, pro la fakto ke la koncernaj pruviloj troviĝas ĉe f-ino Kool hejme.

La farita laboro de la kasisto ili opinias profitdona por la Tutmonda Junular-Organizo.

Leeuwarden (Ned.), la 8-an de aŭgusto 1952-a.

F. Kat - H. Westra.

LA 8-a INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO EN RY.

Jam survoje al Ry mi trovis kelkajn Esperantistojn, inter ili la knabon Hans, kiu tiel lerte parolis Esperanton, ke estis vera ĝojo aŭskulti lin. Ĉiam kreskanta aro da verdsteluloj fine atingis Ry, kie ni jam estis atendataj. Konataj kaj nekonataj vizaĝoj, manpremoj, salutoj, ridoj kaj la sonoj de nia lingvo tuj igis nin senti: nun ni estas denove en Esperantujo!

En la homplena akceptejo deĵoris la nelacigebla Kaj Pedersen, kiu estis samtempe tuta komitato: Kongresa sekretario, kasisto, librotenisto, interpretisto kaj helpanto! Mi ricevis miajn kongrespaperojn kaj iu gvidis min en la turon, kie troviĝis mia portempa hejmo. Antaŭ ol mi ĵetis min en la kirlon de la okazontaĵoj, mi iris sur la platformon de la turo kaj esploris ĉion. La Altlernejo situas apud lago, kiu estas ero el tuta ĉeno de lagoj, kiujn interligas rivero. Bela ĝardeno etendiĝas de la multaj al la lernejoj apartenantaj domoj ĝis al la lago, kie remboatoj balanciĝas sur la ondetoj. Montetoj, kiuj portas arbarojn, borderas la longan lagon; kaj je la alia flanko brilas ruĝaj tegmentoj el inter arboj kaj fruktarboj. Bela regiono etendiĝas antaŭ miaj ravitaj rigardoj kaj la malleviĝanta suno kolorigas la tutan scenon.

Subite akresonanta sonorilo vekis min el miaj pensoj kaj mia stomako flustris aŭdeble: Rapiĉu, ni nun vespermanĝos!

La interkonatiĝvespero kunigis nin pli ol cent partoprenantoj el dek diversaj nacioj en plena harmonio kaj mi konstatis, ke la procentaĵo de „krokodiloj” plimalgrandiĝis.

La solenan malfermon ĉeestis la urbestro de Ry; s-ro Teggelsen, la maljuna lernejestro, pruvigis al ni, ke li ankoraŭ bone regas nian lingvon.

Mi bedaŭras, ke mi ne povas ĉion priskribi, sed estis tiom da bonaj aranĝoj, ke ne sufiĉus la spaco. Pri la jarĉefkunveno raportos la sekretario, sed mi volas aldoni, ke la estraro devas esti dankema al la Dio de la Vetero:



pluis kaj pro tio ĉeestis tiel multaj anoj (aŭ ĉu mi estas tro pesimisma?).

Unu vesperon popoldancgrupo el Ry montris al ni sian arton, dana horo kantis belege kaj krom tio ni havis la plezuron, aŭdi s-ron Williams kun sia horo. Post komuna kafotrinkado ni dancis.

La ŝipekskurso al Silkeborg estis bela, sed ĉion superis la bonege aranĝita ekskurso al Århus, kie ni estis en la manoj de la tieaj gesamideanoj, kiuj antaŭplanis ĉiun paŝon de ni. La urbestro de la urbo akceptis nin en la tre moderna urbdomo, kiu ege plaĉis al mi kaj vespere ni dancis kaj amuziĝis kune kun la Århus-anoj en bela restoracio „Varna”. La tago estis iom streĉa pro la „maltroa” dormo, sed kiel ni povus frue enlitiĝi — nur ok tagojn ni estis en Esperantujo kaj do devis eluzi ĉiun minuton kaj ne povis preterlasi iun ajn aranĝon — ĉu oficialan aŭ neoficialan!

Ekskursoj al Himmelbjerget kaj al la monahejo de Øm estas menciindaj, sed plej grave la Internacia Balo kaj la Festvespero. Ni dancadis, ke la muroj tremis kaj tre ĝojigis nin „La kuzo el Bremen”, teatraĵo kiu estis prezentata de Büsum-anoj. Ali Baba montris sian arton kaj igis kelkajn tiel ridi, ke ili preskaŭ krevis; Daniel, helpite de sia tre ĉarma junedzino, prezentis kabaredon.

Jes, Goethe prave diras:

Tage laboro, Vespere gastoj —

Laborplenaj semajnoj, Gajaj festoj.

La tuta semajno estis gaja festo kaj ni venis hejmen kun novaj fortoj por nia por-esperanta-laboro kaj kun la voko:

Ĝis la revido, geamikoj, en 1953-a en Kufstein!

Günter F. A. Milanowski.

Protokolo de la ĝenerala membrokunveno en Ry (12/8'52).

1. **Malfermo.** Je la 10-a h. la prezidanto, Tammo Kanter, malfermas la kunvenon kaj bonvenigas la ĉeestantaron. Li petas, ke ĉiuj bone eluzu la okazon de persona interparolo por serĉi novajn planojn rilate al la propagando de nia organizo. „Ke tiu propagando estas urĝe necesa”, li diras, „montriĝas el la sufiĉe grava malkresko de la membronombro. Li turnas sin speciale al la ĉefperantoj kun la peto, ke tiuj faru sian laboron akurate kaj vigle, ĉar en la lasta jaro ne ĉiuj el ili faris ĉion necesan. — Ĉar la eksigonta sekretariino neniel havos la okazon protokoli la jarkunvenon, li petas du volontulojn por tiu laboro. Ĉar neniu anoncas sin, la sekretariino deklaras sin preta fari tion, sed deziras por tio esti plene senkulpigita pri neglataĵoj en la protokolo.

2. **Sekretaria jarraporto.** Post laŭtlegado ĝi estas senŝanĝe akceptata.

3. **Kaskontrola raporto.** La kaskontrola komisiono, konsistanta el F. Kat kaj H. Westra skribe raportis kaj la raporto estas akceptata.

4. **Financa jarraporto.** Je la raporto estas kelkaj rimarkoj. Kaj Pedersen demandas el kio konsistas la diversajoj ĉe la enspezoj, ĉar tiu ero estas preskaŭ same granda kiel la ero „kotizoj kaj abonoj”. La kasisto klarigas ke postvenintaj kotizoj de la antaŭa jaro konsistigas tiun sumon. Pluraj personoj petas ke estonte en la financa raporto pli unuope estu anoncataj la diversaj en- kaj elspezoj. Daniel Luez deziras scii, kiujn saldojn en la eksterlando ni havas. La kasisto respondas ke grandaj sumoj el la Orient-Eŭropaj landoj ne estas akireblaj. Pagado per varoj ne estas ebla pro la malfavorega kurzo. Niaj samideanoj en la oriento elspezus grandegajn sumojn por nuligi siajn ŝuldojn, sumoj, kiuj al ni ne tre helpus. Oni decidus estonte ne plu menci tiun sumon en la financa raporto. La cetera parto el tiuj saldoj, pli ol 200 guld., troviĝas en Brazilo, de kie la intertempe eksigita ĉefperanto ne transigas ĝin, kvankam tio estas ebla, pere de banko. Daniel Luez proponas sendi al la eks-ĉefperanto specialan leteron kun „respondo deviga”. La propono estas akceptata.

5. **Buĝeto.** Post rimarko de Helmi Veldhuyzen, ke la profito de la Libro-Servo estas taksita tro alta, la buĝeto estas akceptata.

6. **Projekto por nova regularo.** Komisiite de la jarkunveno en 1951-a, la estraro ellaboris projekton por nova regularo por T.J.O. Ĝi estas pri-traktata paragrafe.

En la unua paragrafo tre multaj ĉeestantoj proponas ŝanĝi la nomon de la organizo kaj enigi la vorton Esperanto. Ili argumentas ke Tutmonda Junular-Organizo en naciajn lingvojn tradukita ne estas klara. Helmi Veldhuyzen opinias, ke oni povus fiksi por ĉiu lando nomon en nacia lingvo kun aldono de la vorto Esperanto aŭ Esperantista. Post voĉdonado oni akceptas la nomon Tutmonda Esperanto-Junular-Organizo, T.E.J.O.

La paragrafoj 2, 3, 4 kaj 5 estas senŝanĝe akceptataj. Ŝanĝo en par. 6b: Anstataŭ 10 procentojn por la laboro en nacia kadro, la estraro ĉiujare fiksis iun procentaĵon por tiu celo. Par. 7 akceptata. Par. 8 ŝanĝata. En la estraro partoprenas du aŭ tri asesoroj. — Vojaĝintersanĝa fako ne jam ekzistas. Antaŭ nelonge la Germana Esperanto-Junularo fondis vojaĝan servon kaj ni kontaktos kun ĝi por eventualaj komunaj aranĝoj. — Laŭ propono

de Majlajlic Atif oni ŝanĝas la ĝis nun validan terminon Internacia Junularkunveno en **Kongreson**. — La ceteraj paragrafoj estas sensanĝe akceptataj.

7. Projekto por I.J.K. regularo. Post aldono de du paragrafoj la kongresa regularo estas akceptata.

8. Elekto de la estraro. La sekretariino informas, ke la kandidatigo de Michel Pilloy ne validas. La prezidanto deklaras, ke la estraro ne proponas kandidatojn. Ĉiuj funkciuloj krom la sekretariino estas reelekteblaj. Li petas al ne-estrarano Günter Milanowski gvidi la elekton de la estraro. Helmi Veldhuyzen ne plu havos okazon sin okupi pri la sekretariado, sed se la prezidanto transprenus ŝian taskon, ŝi volas kandidatiĝi por la prezidanteco. Post balotado Tammo Kanter estas reelektata prezidanto. Ankaŭ la ceteraj estraranoj estas unuvoĉe reelektataj. Por la sekretaria posteno proponas sin J. Kranenburg (Ned.). Helmi Veldhuyzen opinias ke oni ne akceptu iun kiel sekretarion, kiu antaŭ nur unu horo aliĝis al T.J.O. La propono estas malakceptata. Neniu solvo estas momente trovata kaj Helmi akceptas la sekretarian funkcion por ankoraŭ du monatoj. La kunveno konsentas ke en tiuj du monatoj la prezidanto sola elektu novan sekretarion. Post du monatoj Helmi restos asessorino. La ĉeestantaj estraranoj esprimas sian dankon al la anaro kaj unu al la alia pro la montrita kunlaboro. (daŭrigota).

Pro teknikaj kaŭzoj kaj tro malfrua ricevo de manuskriptoj, L.J.V. ĉifoje iom malfruiĝis. Ni petas pardonon pro tio kaj esperas, ke niaj kunlaborantoj bonvolas sendi siajn kontribuojn antaŭ la 25a de la monato.

KORESPONDADRESOJ.

(Ĉiu abonanto unufoje jare rajtas enpresigi senpagan korespondadreson).

Belgujo: dez. kor. kaj interŝ. il. gaz., pk., pm., petas broŝ., librojn, propagandilojn. S-ro Dussaet Camille, Poste Restant, Bruxelles I.

Germanujo: Dez. interŝ. il. pk. kaj pm. kun la tuta mondo S-ro Josef Steppan, (15a) Kahla/Tür. — D.D.R. — Germanujo.

Japanujo: 18 geknaboj (13-15 jaraj) de KANAOKA LOWER SECOND. SCHOOL, 1003, Nagasone Tyō, Sakai Osaka, dez. interŝ. let. ipk. pm. pentraĵojn. Resp. certa.

50 komenc. (knaboj 15-16 j.) dez. kor. kun tutmond. gelernantoj. Skribu al: Keika Chugaku, 34. Haramaĉi, Bunkjo-ku, Tokio.

ESPERANTO-LEERBOEKJE

Voor de lagere school en voor hen, die geen ander dan lager onderwijs genoten, I, II, door

A. A. Appel, Bergen op Zoom

Pr. po f 1,50

Mendu ĉe via Libro-Servo

TEJO-adresoj:

Sekretariejo: Lombokstr. 2,
Leeuwarden

Administr.: G. de Vries, R.P.I.,
Pav. A.B., Bosdijk 771, Eindhoven

KONGRESO, kiu speciale bonvenigos gejunulojn.

Brita Esperanto-Kongreso okazos en bela Bournemouth je **pentekosto** 1953-a. Specialaj aranĝoj por gejunuloj ĉiulandaj. Premioj por ĝis 23-jaraj Britaj Komencantoj.

Petu ĉiun informon de s-ino W. Laurie, 6 Marlborough Rd., Bournemouth. — Hon. Sec. Local Congress Committee.